La Letero
Espéranto Angers
2018 - 12

## La kursoj en Anĝevo

Espéranto-Angers proponas al vi 3 kursojn dum la lernojaro 2018-2019 :

- **kurso por komencantoj** (por eklerni Esperanton) **mercrede - 19h**.
- **kurso por postkomencantoj** (por progresi en Esperanto) **mercrede - 17h30**.
- **paroliga kurso** (por praktiki Esperanton) **vendrede - 18h**.

Kursejo : kunvenejo Petit-Mathurin, 44 avenuo Jean XXIII (La Roseraie), Angers. Tramostacio : Jean XXIII.
La kursoj estas senpagaj por la membroj (aliĝo al Espéranto-Angers : 22 eŭroj + lernolibro : 10 eŭroj).

## *Kulturheredaj tagoj en Greziljono*

En la pasintaj 15a kaj 16a de septembro, okazis kulturheredaj tagoj en Greziljono, kiel ĉie en Francio.
Por proponi ion novan, ĉi jare, Paŭlino Gaborito organizis pentrotagojn paralele al la vizitado de la kastelo, de la kromkonstruaĵoj kaj de la parko.
Ekspoziciis kaj pentris surloke Serĝo Sir' kaj Paŭlino Gaborito en la Zamenhofa salono kaj ekstere. Vizitigis Vito Markovo, Berto Ŝuman' kaj Rene' Ĝelink'.
Ĉirkaŭ 80 homoj venis aŭ por vidi la pentraĵojn, aŭ por viziti la kastelon, aŭ por paroli pri Esperanto. Ĝenerale, la homoj estis pli allogitaj pri la historio de Greziljono. Ni tamen ege varbis por Esperanto.
Kelkaj Esperantistoj el Anĝevo vizitis nin dum la semajnfino.
Ni deziras proponi ion alian por la venonta jaro : teatra vizitado kun profesiaj aktoroj (Flora' Markov' kaj Aleks' Gangel'), ekspozicio kaj vendo de lokaj produktoj kaj atelieroj (kaj kial ne, kursoj de Esperanto).
Se interesas vin partopreni en la venontjaraj kulturheredaj tagoj,
kontaktu Paŭlinon je 07 83 44 40 40.





## *Nigra humuro*

*Sendita de la anĝeva komencantogrupo*

### La mistero de la ĉambro n° 311 klarigita

Dum kelkaj monatoj, oni kredis ke la "311" en urba malsanulejo de Sud-Afriko estis malbenita. Ĉiuvendrede matene la flegistinoj malkovris mortinton en tiu dormoĉambro en la sekcio de intensa flegado.
Ja certe la pacientojn oni traktis per gravaj kuracrimedoj sed ili ne plu estis en mortdanĝero. La flegista skipo, perpleksa, pensis pri bakteria infektado de la ĉambra aero. Alarmite de la viktimaj familioj la aŭtoritatoj mendis enketon. Ĉar la "loĝantoj" de la 311 plu mortis laŭ semajna kadenco, oni fine organizis kaŝobservadon en la dormoĉambro. Kaj la mistero solviĝis : ĉiuvendrede, ĉirkaŭ la 6a matene, la purigistino malkonektis la spirmaŝinon de la paciento por konekti sian polvosuĉilon....

# *La grupeto « Biblioteko » informas vin...*




Eblas pruntepreni :


- unu ekzempleron de la revuo de **UNESKO** (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo) : ĝi ekde nun ekzistas en Esperanto (Unesko Kuriero) ! La redakcio daŭre serĉas bonvolemajn tradukantojn por traduki artikolojn al Esperanto.

- unu ekzempleron de la revuo **Heroldo de Esperanto** kiu denove aperas ! Ĝia devizo estas : « Ni pripensas la mondon » . Ĝi pritraktos la aferojn internajn de Esperantujo sed ankaŭ de la cetera mondo !

Por pliaj informoj, sendu ret-mesaĝon al : **biblioteko@esperanto-angers.fr**

---

# *Turneo de Dennis Keefe (Usono)*



*Dennis Keefe kaj Frédéric Lauriol*

Dennis Keefe estas Esperantisto de Usona deveno kiu ŝategas lingvojn. Li eĉ parolas 7 lingvojn.

Lundon la 5-an de novembro vespere ni havis la plezuron akcepti lin en nia kutima kursoĉambro en Angers, kie ni vespermanĝis en agrabla etoso kaj...en Esperanto, kompreneble !
Li petis de ni ke ĉiu prezentu sin kaj ni interŝanĝis pri la vivo en Anĵuo, niaj fakoj, ktp... Li ankaŭ parolis pri la Esperanta disvolviĝo en Ĉinio kie li vivis ĉirkaŭ ses jarojn kaj en Hispanio kie li vivas nun.
Krome, li parolis pri sia rekta metodo, la Bekkurso (Baza Esperanta Kurso).

La sekvan vesperon Dennis prezentis sian prelegon kies titolo estas : "Esperanto. Kial? Kiel?". Deko da partoprenantoj aŭskultis lin en la franca ĉar li bone regas tiun lingvon.
Dennis unue parolis pri la fonto de Esperanto, ĝia "patro" Ludoviko Lazaro Zamenhof, kaj pri la plenespera komenciĝo de tiu nova lingvo.
Poste, la du mondmilitoj profunde vundis la Esperantistojn devigante la movadon rekonstruiĝi.
Kurioze, la falo de la berlina muro, kiu malfermis la Orient-Okcidentajn landlimojn malhelpis Esperanton. Antăŭe ĝi estis pli-malpli favorita de la tiutempaj registaroj pro "internacia pensado". La angla profitis la okazon ĉar ĝi estis, kaj ankoraŭ estas, taksita kiel malfermanta ilo al okcidenta mondo.
Pli poste, la alveno de Interreto (interalie de Duolingo.com) ŝanĝis la paradigmon. Nun, la junuloj kapablas rapide lerni Esperanton kaj uzi ĝin laŭ ties origina celo : esti komunikilo.

**Kiel lerni Esperanton ?**
Dennis klarigis al ni, ke diversaj motivoj povas ekzisti. La facileco de la lingva lernado, ĝia neŭtraleco kaj ĝia uzado dank'al "la reto", kiu ebligas la parolantojn renkonti tutdevenajn homojn kaj interŝanĝi kun ili.

**Kial :**
Dennis parolis pri siaj propraj spertoj, li starigis intensajn kursojn kelksemajnajn ĉefe por kaj kun Azianoj. Plie, li havas la projekton organizi aliajn kursojn kun Azianoj kaj Eŭropanoj por eksperimenti komunajn staĝometodojn kvankam la aliro al la lingvo estas malsama (vortprovizo - gramatiko).
Li indikis ankaŭ kelkajn interesajn filmojn kaj lerno-retejojn.

La vespera renkontiĝo finiĝis per liberaj interŝanĝoj inter la preleganto kaj la publiko.

---

**Espéranto-Angers**
3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France
Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - http://www.esperanto-angers.fr - info@esperanto-angers.fr